# EKO 2026

ILEI kongresos en Ĉinio
Fervojistoj en Serbio
Afriko semas refoje

EKO 2026-3. Januaro 31




## Brave ILEI kongresos en Ĉinio

En 2026 la Kongreso de ILEI okazos ĉe Zaozhuang-a Universitato, en urbo Zaozhuang de Shandong-Provinco de Ĉinio, de la 10-a ĝis la 16-a de julio. La evento okazos kunlabore kun la Universitato mem, kiu estas sidejo de la plej granda Esperanto-Muzeo de Azio kaj de la sola Esperanto-fako nuntempe aktiva oficiale agnoskata de la Ĉina Registaro. La temo de la Kongreso estas "Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti Esperanto-kulturon", dum la Simpozio esploros pli science la temon "Plialtigi lingvan konscion", tre gravan en tempoj de A.I. La unuaj tagoj de la Kongreso havos buntan preleg-programon, inkluzive de tri seminarioj pri la kongresa temo kaj de du-taga Simpozio kun la partopreno de doktoroj kaj profesoroj el diversaj landoj. La lastaj tri tagoj de la Kongreso estos tute dediĉitaj al la esplorado de la kultur-riĉa provinco Shandong, hejmloko de famaj filozofoj kiel Konfuceo kaj Mozi.

Bonvolu rapide aliĝi per la suba formularo.

https://forms.gle/LVbz3WHLfAnrZbFA6

## 77-a IFK Serbio, Beogrado, Mokra Gora

Jam komenciĝis la aliĝoj al la nunjara Internacia Fervojista Kongreso, kiu okazos de la 23-a ĝis la 30-a de majo 2026 en Serbio. Jen la aliĝilo, kiun eblas plenigi per Google- formularo.

https://forms.gle/CYyetgbs8eoCZ53SA

## Afrika verko serĉas eldoniston

Mi atendas iom da tempo por respondi al la mesaĝo de S-ro Espoir KASATI. Mi verkas tekston pri la urbon de PALIMÉ kiu gastigos la 9- an

nacian kongreson de Esperanto en Togolando. Ĉiu tiu teksto ĝenerale estos pri la prefektujo de "KLOTO" kies PALIMÉ estas la ĉefurbo. B.N. La teksto estos verkita surbaze de la turisma plano, laŭ kiu mia libro estis verkita. Se iu havas demandojn mi estas preta je la dispono.

Kossi WOUDJI. Nomata: Nigra Infano.

## Afriko semas kaj semas konstante

La Afrika Komisiono de UEA lanĉas freŝan alvokon al esperantistoj kaj organizaĵoj en Afriko por partopreni en la konkurso de la programo “Ni semas”, kiu celas subteni konkretajn projektojn por disvastigi kaj fortigi Esperanton sur la kontinento. Legu pli ĉe https://www.esperanto-afriko.org/2026/01/24/nova-alvoko-konkurso-por-subvenciotaj-projektoj-en-afriko/

***SMG*** starigis la programon ;Ni semas’ en 2013, tuj post elektiĝo al la Estraro de UEA en Islando 2013, Ĝi celis ;iveri modestajn monsumojn por indaj malgrandaj projektoj (semo-mono). Ĝi celis la tutan mondon, sed praktike venis petoj nur el Afriko, Klare, ;a programo vivas tie jam 15 jarojn poste,

## Kunlaboro inter UEA kaj Unesko-lernejoj diskutatatu

La Estraro de UEA baldaŭ **decidos** provprojekton pri kunlaboro inter UEA kaj la reto de Asociitaj Lernejoj de Unesko, sub la titolo: ***Esperanto en Edukado por Mondcivitaneco, Daŭripova Evoluigo kaj Interkultura kaj Heredaĵa Lernado****: provprojekto por Lubumbaŝo, Kongo*.DR

Detala prezento troviĝas en la komitata elŝutejo: https://uea.org/teko/komitato |

La projekto celas kontribui al strategia deziro de UEA: iri de nura reprezenta ĉeesto ĉe Unesko al utiligo de Esperanto por la komunaj celoj de UEA kaj Unesko. La afero plenumas la strategian planon AKIRI (2025–2030), aprobita de tiu ĉi Komitato. Resume: Unesko mastrumas tutmondan reton de preskaŭ 10 000 asociitaj lernejoj , laborantaj laŭ tri kernaj prioritatoj:

## Gvatemalo en HPK

Inter la 123 membroj de la I*nternacia Patrona Komitato por la Zamenhof-Jaro* [ en 1959 ] , estis la jenaj Gvatemalanoj :

- D-ro Carlos Martínez DURÁN, **Rekt. de la Nacia Universitato** de Gvatemalo ;
- Lic. José Mata GAVIDIA, Dekano de la Fakultato pri Sociaj Studoj,
- Kolonelo Marco Aurelio MÉRIDA, Ministro de Publika Edukado ;
- Lic. Jesus Unda Murillo, Ministro de Eksterlandaj Aferoj ;
- Lic. Adolfo Molina ORANTES, Direktoro de la Nacia Komisiono de Unesko, Gvatemalo.

## Kanada Lumo

Jen la plej nova numero de “Lumo”, kaj la lasta sub mia redaktado (la torĉon transprenos nia kara amiko kaj samurbano, Garry Evans, aka kiel "s-ro Mann" de la teatraĵo "1910"). Tiu ĉi numero estas aparte bunta! Atendas vin profunda esploro de la temo Esperanto kaj kinoarto. Mi dediĉis ĝin al tiu temo pro la apero de nova kanada profesia filmo en Esperanto, “Himalia” -- projekto, en kiu partoprenis multaj anoj de Esperanto-Societo Kebekiakaj kies rezulto estas absolute brila (eŭropanoj, atentu! Vi povas spekti ekde la 7-a de januaro rete en la kanalo Arte.tv - diskonigu)! Vi legos plurajn artikolojn pri la granda evento de la jaro -- la Dulanda Kongreso. Kiel ĉiam atendas vin pluraj aliaj artikoloj kaj literaturaj kontribuoj. https://esperanto.ca/lumo/

//Prenita por EKO 2.Ĵenja Amis, la redaktoro

*n danko al miaj provlegistoj!*

Kunlaborantoj: Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE) kaj Perlo Miela (HU)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

### Kvardek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.